



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

NIA ĜENERALA ASEMBLEO

La Ĝeneralan Kunvenon de "ESPERANTO-NORMANDIE" partoprenis 30 gesamideanoj venintaj el ĉiuj departementoj de nia provinco. Kompreneble, pro distanca motivo, membroj el Seine-Maritime (76) estis plej multaj.

La kunveno okazis en Rouen dimanĉe 2an de Aprilo en salono de "Halle aux Toiles". Matene okazis kunveneto de estraranoj por prepari la diskutojn kaj organizi la posttagmezan renkontiĝon.

La komuna tagmanĝo en memserva restoracio "Flunch" estis bona okazo por retroviĝi kaj interbabili. La etoso estis simpatia kaj eĉ gaja ĉar 2 estraranoj (Petro P. kaj Petro Q.) kiuj naskiĝis la saman tagon (kvankam ili ne estis ĝemeloj!) festis sian naskiĝdatrevenon.

Yves NICOLAS, Prezidanto de nia asocio malfermis la ĝeneralan kunvenon salutante la ĉeestantojn. En la morala raporto li memorigis la diversajn agadojn okazintajn de unu jaro: klopodojn por informi kandidatojn por Eŭropa parlamento, -organizado de konferenco Hagège/Moon en Mémorial de la Paix; organizado de prelegvojaĝoj. Li ĝojas ke rilatoj kun niaj ĝeamikoj el Malsupra Saksio bone disvolviĝas kaj eble la Eŭropa kongreso en Oostend estos okazo por unua renkontiĝo.

Delegitoj el diversaj normandaj kluboj komentis la agadojn en sia urbo. Tiel ni povis konstati la vigecon de grupo en Hérouville Saint Clair (14) kaj Grand Quevilly (76), la naskiĝon de novaj kluboj en Cherbourg kaj en Saint Lo kaj eble en Dieppe ĉar nun tie loĝas 2 junaj aktivulinoj. La grupo en Le Havre kunvenas ĉiumonate; grupanoj diskutas pri elektita temo. En Fécamp, Mouloud kaj Taous Touileb daŭre propagandas sed ne sukcesis, - ĝis nun, oficiale krei novan grupon.

Pierre Quillaud informis pri redaktado de "Normanda Bulteno" kiu verŝajne interesas multajn ĉar li ricevis neniun kritikon (...nek sugestojn). André Morio redaktas la lastan paĝon kiu estas precipe interesa por legantoj de departemento "Manche" (50).

La morala raporto estis aprobita unuanime.

La kasisto P. Quillaud komentis la financon raporton kiun ĉiu jam legis en marta bulteno kaj precizigis kelkajn informojn. Li bedaŭrinde devis forstreki de la membro-listo tiujn kiuj ne pagis abonkotizojn.

La financa raporto estis aprobita unuanime.

Estontaj Agadoj: Ni daŭrigu niajn klopodojn por informi pri Esperanto kaj organizi prelegvojaĝojn de eksterlandanoj.

Renovigo de estraro:

Ni bedaŭras la demision de Sylvie Caron
 Neniu nova kandidatigis
 La aliaj estas reelektitaj unuanime

Yves NICOLAS dankis la partoprenintojn kaj oficiale fermis la kunvenon.

Poste, li salutis gesinjorojn Shen kaj Wang ĵus alvenintajn el Ĉinio por fari prelegvojaĝon tra Francio. Li transdonis al ili la parolon Kaj ili faris interesan priskribon pri la nuna vivo en sia lando kaj precipe en Pekino.

Pierre Quillaud

Parto de tiu artikolo jam aperis en bulteno de niaj geamikoj en Malsupra Saksio:

"Esperanto in Niedersachsen"

ESPERANTO-NORMANDIEUnion des Espérantistes de Normandie

Listo de estraranoj elektitaj dum la Ĝenerala Kunveno, en Rouen la 2an de Aprilo 2000

Prezidanto: Yves NICOLAS, 17/37 Quartier du Bois
 14200 Hérouville Saint Clair Tél. 02 31 95 11 81
 yvanmi@club-internet.fr

Vic-prezidanto Pierre POTTIER, 21 Allée des Roitelets
& Sekretario 76190 Yvetot .Tél. 02 35 95 03 09

Kasisto kaj Pierre QUILLAUD, 16 rue Lt Vaisseau Paris
Bultenisto 76120 Grand Quevilly Tél. 02 35 69 66 09
 pierre.quillaud@wanadoo.fr

Eksteraj rilatoj

(Malsupra Saksio): Christian LEVESQUE, Les épinettes
 St Michel des loups 50740 Carolles Tél. 02 33 91 75 08

Kunordinantoj por junuloj:

Por Supera Normandio: Sébastien ERHARD 13 ter rue Raymond Botté
 76380 Canteleu Tél. 02 35 36 18 36
 hodos@free.fr

Por malsupra Normandio: Yves BACHIMONT 106 rue d'Orléans
 14000 Caen Tél. 02 31 75 15 74
 YBachimont@esperanto.org

Grupdelegitoj: Sylvie BONNET 6 Bvd Néhou

27700 Les Andelys Tél. 02 32 54 64 32
 Jean GIBAUD 28 rue Raoul Dufy
 76600 Le Havre Tél. 02 35 42 18 66
 Mouloud TOULEB rue des oiseaux
 76540 Elétot Tél. kaj faks 02 35 29 99 88
 Dominique CORRIEU CHAPOTARD 21 Avenue Rauss
 76370 Berneval le Grand Tél. 02 35 83 14 83
 pierre.corrieu@compuserve.com
 Christine LEMERCIER 8 Avenue des oiseaux
 76370 Rouxmesnil Tél. 02 35 84 37 86
 christine.lemercier@wanadoo.fr

Por Orne (Dép 61) Anne-Marie LEPREVOST 62 rue de la XI^e DB 61100 Flers

La komitatanoj de U.N.E. estas samtempe komitatanoj de Normanda Federacio kondiĉe ke ili estu membroj de Esperanto France (U.F.E.)

Informoj:

Nia amiko André MORIO kiu estis vic-bultenisto kaj kiu redaktis parte nian bultenon, -precipe la paĝon de departemento Manche (50) baldaŭ transloĝigos kaj forlasos Normandion. Estas domaĝe por nia regiona unuiĝo kaj por la grupo el Saint Lo. Ni deziras al li kaj al lia edzino bonan sukceson kaj bonan sanon en alia regiono.

Adresses électroniques:

Si vous utilisez le réseau "internet" (interreto), veuillez nous communiquer votre adresse "e-mail". Indiquez nous si vous désirez adhérer (gratuitement) au réseau: "normandio@groups.fr". Nous pourrions ainsi vous transmettre rapidement les informations concernant l'Esperanto.

Veuillez contacter Sébastien Erhard "hodos@free.fr"

EMPLOI "JEUNE":

L'Etat français, le Département des Côtes d'Armor en région Bretagne et la ville de Saint Brieuc paieront un jeune pour soutenir la présentation d'une "valise pédagogique" sur l'Esperanto dans les écoles du Département qui en auront fait la demande. La subvention atteint au total 108840 F par an durant 5 ans c'est-à-dire plus de 90% du coût du SMIC, charge sociale comprise.

Et maintenant, devinez quel jeune ont choisi nos amis de la Fédération de Bretagne? Il s'agit de Sébastien Erhard, responsable des jeunes de Haute Normandie et membre enthousiaste du groupe de Grand Quevilly. Il est âgé de 20 ans. Nous lui souhaitons beaucoup de succès.

ABONNEMENTS-COTISATIONS:

Au mois de Juin, de nombreux abonnements à "Normanda Bulteno" ne nous sont pas encore parvenus. Certains d'entre vous recevront donc avec ce bulletin un rappel. Nous pensons utile de vous rappeler certaines règles.

Notre association et notre bulletin sont indépendants des grandes associations nationales et internationales. Ce qui signifie que l'adhésion à U.F.E. ou à SAT-Amikaro n'inclue pas la réception de Normanda Bulteno.

Notre bulletin est envoyé gratuitement à d'autres revues (échanges), à des organismes amis. Nous l'envoyons également sans abonnement à de nouveaux espérantistes ou à des élèves dont on nous communique l'adresse. Pour continuer à le recevoir, il faut ensuite régler un abonnement annuel qui est en ce moment de 50 F. Ceux qui sont membres d'un groupe local et qui paient déjà une cotisation à leur club peuvent ne payer que 35 F à condition que cet abonnement me parvienne par l'intermédiaire du trésorier de votre groupe.

L'abonnement-cotisation est aussi utilisé pour nos autres activités: informations, correspondance, contribution aux frais de voyage des étrangers que nous invitons pour faire des conférences etc...

Le Trésorier

NIA VIVO EN:

GRAND QUEVILLY: Kunvenoj okazas ĉiujarde vespere en Centre Socio Culturel. Dum niaj kunvenoj, ni diskutas pri iu temo; ni legas la romanon "Vualo de l'silento" kiu rakontas la vivon de juna kabilino mortkondamnita de sia familio, ĉar ŝi transpaŝis la praaĵn regulojn kaj elektis kiel vivkunulon Francon kaj generis kun li infanon. La aŭtorino vipas la nekredeble arkaismajn vivkondiĉojn de iuj islamaj virinoj en la nuntempa Eŭropo.

Krom legado kaj gramatikaj klarigoj, ni ankaŭ kantas.

Ni organizi s specialan kunvenon por akcepti Lilia Sergejeva el Sankt-Peterburgo, korespondantino de Marie-Line. Post la kunveno, ni ĉiuj vespermangis en kresporestacio.

LE HAVRE: Forpasis konata Havra esperantistino

Adiaŭ amikino Janine

Nia havra amikino Janine Séry forpasis komence de majo. Fidela kunlaborantino de Havra Esperantista Grupo de multaj jaroj, Janine estis konvinkita samideanino kiu alportis ĉiukaze saman sindonemon kaj spertecon. Nur sanproblemoj malebligis al ŝi daŭre ĉeesti esperantajn okazaĵojn kaj partopreni antaŭenigadon de nia afero.

Adiaŭ amikino Janine. Al ŝia fratino, al ŝiaj gefamilianoj, ni prezentas plej sincerajn kondolencojn.

Sylvie CARON

ESPERANTO-NORMANDIE DEZIRAS AL VI AGRABLAJN FERIOJN EN ESPERANTIO!!!

LES ANDELYS: Eminent esperantistino Janine VINCENT forpasis.

Janine Vincent estis dum longaj jaroj prezidantino de grupo en Les Andelys. Post emeritiĝo, ŝi forlasis Normandion kaj restadis en Baugé proksime de Kastelo Grésillon. Ŝi dediĉis sian vivon por Esperanto. Ŝi majstris la lingvon kaj tradukis francajn ĉefverkojn esperanten. Ŝi estis aktivulino de Esperanto movado, Esperanto-France, Institut français d'Esperanto kaj katolika esperanto movado. Ni eksciis ŝian morton dum Pasko; tiam kongresis SAT-Amikaro; kongresanoj honoris ŝin per unu silenta minuto. Estas granda perdo por la franca Esperanto movado.

En la Normanda Bulteno N°203, vi legis scienfikcian noveleto verkitan de Henri Rousseau en urbeto Mathieu (Calvados). Ĝi interesis kelkajn legantojn. Eĉ unu el niaj geamikoj el Malsupra Sakcio, Karl Schliuter skribis: "Mi legis kun granda intereso Normandan Bultenon. Speciale amuziga estis la scienfikcia noveleto de Henri Rousseau pri la estonteco de la sporto".
Jen aldono kiu estas verkita de Père Marc (kun konsento de H.Rousseau)

ALDONO AL "PLILONGIGO DE TENDENCOJ"

Sebastiano R. estis elirona kiam okazis neimagebla evento, kiun la ĵurnalistoj ne raportis: subite oni aŭdis en la megafono kriegon: "Vivu Eŭrofrankio libera!" Du jarcentoj antaŭe, tia krio jam estis rigardita kiel hipertrofio de la nacia sento; sed por la spektantoj de la dudektria jarcento, ĝi estis reala frenezaĵo. Tial la deĵore ĉeestanta Deputito de la Partio de la Feliĉo, - tiu partio regis la landon de ok jaroj -, panikis kaj prenis la respondecon uzi siajn prerogativojn por silentigi la ekstervojan entuziasmulon.

Sekve de la sekeco de 2.196, (tiam oni elvokis la jaron 1976 por trovi samnivelan fenomenon), la Ministro pri Sano estis sukcesinta naciigi ĉiujn firmojn de mineralaj akvoj, kaj samtempe malpermesi la uzadon de sanvidpunkte suspektaj alidevenaj akvoj. Tiel oni povis aldoni al la Nacia Akvo, produkton de ultrasekreta formulo kiu forigis ĉiun angoron kaj inhibiciis ĉiun iniciaton. La Partio por la Feliĉo regis kaj neniu sin riskis, nek emis al opozicio. Plie la Ministro pri Nacia Edukado estis elprogramiginta la instruadon de Historio, pretekste ke pro ĝia troa elvokiveco de konfliktoj, ĝi morale suferigis la infanojn.

Do la krio de Emilio Flambard, de ok jaroj estis la unua esprimo de malkontento en la lando. Jen kiel tia evento estis povinta okazi: Maltrafa informatika manipulado estis kondukinta Emilion Flambardon al la keloj de la Nacia Asembleo. Tie li estis rimarkinta stokegon de minerala akvo de marko "La Vera Fonto", tute nekonita. Li estis sukcesinta forporti kompletan paletaron. Post kelktaga trinkado de tiu akvo, li sentis ŝanĝon en sia personeco: li fariĝis malpli naivege feliĉa. Li demandis sin ĉu la vivo havis celon, de kie li venis kaj kien li iris. Eĉ pli, li sentis bezonon krei ion. En la stadiono, subite tiu nekutima kunveno estis ekscitinta lian bezonon je esprimiĝo. Sed de kie venis tiu krio, tiu alvoko kiu transiris lin? Li ne sciis. La policanoj kiuj arestis lin agis kun tiom da konsidero ke li ne timis; la kuracisto kiu lin ekzamenis manifestis tion farante, preskaŭ patrinecan mildecon, kaj limigis sin je ordonado de longdaŭra hejma ripozo, kunigita kun abunda konsumado de la Nacia Akvo, la "Akvo por Feliĉo", la plej bona li precizigis....

Sed Emilio Flambard daŭrigis trinki sian sekretan markon kiun la Deputitoj rezervis al si. Kiam, post kelkaj tagoj la kuracisto iris liadomen por rutina kontrolo, li trovis la pordon malfermitan. Bileto estis sur la tablo: "Voĉo diris al mi ke insulo ekzistas kie la liberaj homoj estas kapablaj vivi kaj krei. Mi eliras por trovi ĝin. E.F."

Malfeliĉa infano, murmuris la doktoro, kaj li viŝis larmon

Père Marc (50480-Chef du Pont)

Televida elsendo spektita de esperantistino

Reportaĵo estis elsendita ĉe televido pri ekspluatado de handikapuloj kaj speciale de surduloj.

Iu junulino rakontis permane sian historion. Ŝi venis el Pollando kie ŝi vivis tre malfacile. Iutage, du personoj venis en ŝian domon proponante al ŝi laboron en Francio, sufiĉe bone pagitan per dolaroj. Ŝi demandis kia laboro tio estas. Ili respondis ke ŝi estos mastrumistino kaj laboros kun aliaj surduloj. Alveninte en Francio, ŝi renkontis sian mastron kiu estis ankaŭ surdulo. Ŝi donis al li sian pasporton ĉar li diris ke li zorgos pri normaligo de ŝia situacio en Francio.

Poste li donis al ŝi klarigojn pri la laboro: ŝi devos iri en restoraciojn, en kafejojn kaj disdoni kartetojn klarigante ke ŝi estas surdulino sen vivrimedo kaj proponante al klientoj pagi 10 Frankojn interŝanĝe de bagatelajo (ŝlosilringo, ktp...) Unue ŝi rifuzis tian laboron. Tiam la mastro diris ke se ŝi ne volas labori tiamaniere li bruligos ŝian pasporton kaj ne plu zorgos pri ŝi. Kion fari, sola en Francio sen mono? Kun aliaj polaj surduloj, ŝi do rezignis kaj laboris ĉiutage kaj precipe nokte en pluraj kvartaloj de Parizo. Dum somero ŝi laboris sur la strandoj, sude de Francio.

Ŝi diris ke ofte ŝi kolektis sufiĉe da mono; La mastro malmulte pagis ilin donante etan procentaĵon; li malbone nutris kaj loĝigis ilin. Li kelkfoje uzis perforton. Estas iaspekco de mafio. La centro de tiu mafio en Francio estas la urbo Mulhouse kie poloj aŭ alilandanoj de orientaj landoj alvenas.

Oni povas renkonti tiajn vendistojn en trajnoj.

SUZANNE (el Grand Quevilly 76)

“ESPERANTO -INFO”réapparait

Le bulletin trimestriel d'information sur la langue internationale réapparait . Le dévoué Robert LLORENS a trouvé un successeur pour rééditer cette revue tout en français. Abonnez vous et abonnez aussi des amis et des personnalités non esperantistes.

Abonnements: Membre simple : 50 FF, Soutien : 60 FF

Chèque bancaire ou postal à l'ordre de “Esperanto-Info” CCP Marseille 11 901 46 B
à envoyer à Esperanto-Info 9 rue du Château d'Eau 82290 Meauzac

LE CONGRES DE SAT-AMIKARO

J'ai participé au 55^{ème} Congrès de SAT Amikaro à Fouquières-lez-Lens dans le Pas de Calais durant le week-end de Pâques 2000.

Un congrès est une excellente occasion de retrouver des amis et d'améliorer sa pratique de la langue en participant aux débats, aux conférences et en discutant pendant les repas avec ses compagnons de table. Le côté touristique n'est jamais oublié même dans cette région du Pas de Calais souvent méconnue et pourtant si intéressante.

Petro KIJÓ

COMPTE-RENDU du SERVICE de PRESSE de SAT-AMIKARO:

Ce congrès représentait une première en France par le fait que le Maire de Fouquières, M. Michel Bouchez, son épouse Michelle et leurs enfants parlent l'Esperanto.

Le Pas de Calais est le département qui en 1905 a accueilli le 1^{er} Congrès Mondial d'Esperanto. C'est aujourd'hui l'un des départements où l'Esperanto dans sa vocation de langue commune (et non unique) reçoit le soutien politique le plus ferme auprès de ses députés européens. Le Sénateur Daniel Percheron qui a participé à l'ouverture a pour sa part très bien mesuré l'importance de l'enjeu linguistique en parlant de “la langue du village global”

Le thème choisi par ce congrès de SAT-Amikaro correspond à un besoin qui résulte du nouvel essor de l'Esperanto : “Une urgence : la formation d'enseignants d'Esperanto”

En effet, Internet devient aujourd'hui l'un des principaux moyens par lesquels le public découvre cette langue sous divers aspects : origine, histoire, moyens de l'apprendre, étendue des applications, vocations, perspectives etc... Le mot “Esperanto” livre lui-même un grand choix de sites Web à partir de divers moteurs de recherche. Il résulte de cette nouvelle situation que trop de personnes qui veulent passer à la pratique ne trouvent pas un enseignant à proximité pour l'apprendre. Un effort est donc demandé en faveur d'une formation intensive à cet enseignement.

Le congrès a rendu un hommage particulier aux mineurs par une cérémonie avec dépôt d'une gerbe de fleurs devant le monument de Fouquières consacré aux victimes de la mine. Il était logique pour SAT-AMIKARO qui met au premier plan les valeurs humaines, éducatives, culturelles et sociales de l'Esperanto que des visites soient effectuées aussi au Musée Minier de Lewarde et au Centre de la Paix à Vimy et à Lorette.

Dans cette région durement éprouvée qui se cherche de nouvelles vocations et orientations, les terribles prennent eux-mêmes, peu à peu, la couleur verte de l'espoir, celle qui symbolise aussi l'Esperanto.

Henri MASSON

La sekvanta numero de Normanda Bulteno aperos fine de Septembro.

Mi nepre bezonos vian kontribuadon. Sendu do al mi artikolojn plej malfrue la 24an de Septembro

La Redaktoro

La paĝo 6a estis verkita kaj tajpita de nia amiko André Morio el Saint Lo (Departemento 50)

Li provtradukis paĝon de libro de Philippe Delorme. Traduko de literatura teksto estas malfacila. Eble, vi malaprobos la tradukon de Andreo kiu certe enhavas lingvajn erarojn. Do vi mem provu fari pli bone; tio estos via tasko por la feria tempo!!!

Korno de bovino

Tedita donaco

Ĉu esence donaco por la infanoj, aŭ objekto-memoro?

Tuta hiato tie estas. Fine de la kvindekjaroj, komence de la sesdekjaroj, oni ĝin donacas ĝenerale je infanoj. Malfacile eksalti pro ĝojo antaŭ tiu aĵo kun necerta statuto, kiu ankaŭ povus esti kroĉenda ĉe muro, apude vidindaĵo el la Lazura Bordo aŭ sur unupieda tableto, apude hispana dancistino.

Sed nu, laŭdire tiu estas ludilo, oni estas ĝentila, endas afable akcepti; tamen, ni ne troigu. La bovinkorno estas unu el tiuj objektoj, kiun oni ne povas eksperimenti sen ridindeco antaŭ la adoltoj arigitaj - oni jam de ĝi havis du aŭ tri, kaj oni ja scias ke ĝi kaŭzas nur bleketon sufiĉe bagatela konsiderinte la amplekson supozitan de tiu akustika korneto natura.

Ne, la bovinkorno ne povas ekzisti nur en soleco. Oni jam vidis, en ia librilustritaĵoj el la Verda Biblioteko, liberan kaj majestan paŝtiston paŝeganta interspacon kun ĉirkaŭ la kolo, simila korno.

Tial, pri la granda serio de la aventuroj kondicionale, oni povus diri ke oni estu en profunda montaro, paŝtisto juĝrajtanta, kiu ŝajnigus nur almeti objekton al sia buŝo - pro timo ĉion frakasi de ridinda mekanika bruoj. Tiu granda peno neniam longtempe daŭrigiĝas - pri kondicionalo, la aventuroj de paŝtisto ne sciis konkuri kun tiuj de Zorro, Ivanoe, aŭ Bufalo Bil.

Kion fari pri la korno, kiam la imageco ne plu sekvas?

Oni ĝin turnas, oni ĝin enspiras, kaj la malbono estas evidenta: "Tio fetoras!". Kompreneble tio pruvas, ke ja temas pri vera bovinkorno sed fine.... Iaj kornoj malpli trompaj okazigas malpli da aktoraĵo. Oni povas tie legi per nigra inko: "Memoraĵo el Alpe d' Huez". Ŝanco al ili estas akirita, finiĝi kroĉitaj ĉe muro. Sed pri la kornoludo, la prognozo estas nuliga: funde de la ŝranko.

Andreo



La Corne de vache

page 155

Le cadeau empoisonné

Est-ce par essence un cadeau pour les enfants où un objet - mémoire? Tout le hiatus est là.

A la fin des années 50, au début des années 60, on l'offrait généralement aux enfants. Difficile de bondir de joie devant cette chose au statut incertain, qui pourrait aussi être accrochée au mur, à côté d'une vue de la Côte d'Azur ou sur un guéridon à côté d'une danseuse espagnole.

Mais bon, il paraît que c'est un jouet, on est bien élevé, il faut faire bonne figure. N'exagérons pas quand même! La corne de vache est un de ces jouets qu'on ne peut expérimenter sans ridicule devant les adultes rassemblés - on en a déjà deux ou trois, et on sait bien qu'elle ne produit qu'un couinement assez dérisoire eu égard à l'ampleur supposée de ce cornet acoustique naturel.

Non, la corne de vache ne peut prendre de sens que dans la solitude. On a déjà vu, sur quelques illustrations d'un livre de la bibliothèque verte, un berger libre et majestueux arpentant l'espace, avec autour du cou une corne semblable. Alors la grande série des aventures au conditionnel, on pourrait dire que l'on serait dans une montagne profonde, un berger justicier, qui ferait mine seulement de porter l'objet à sa bouche - de peur de tout casser, avec le bruit mécanique ridicule. Ce bel effort ne se poursuit jamais longtemps - pour le conditionnel, les aventures du berger ne sauraient rivaliser avec celles de Zorro, Ivanhoé, ou de Buffalo Bill. Que faire de la corne, quand l'imaginaire ne suit plus? On la retourne, on la respire et le mal est flagrant: Ça pue. Bien sûr, cela prouve qu'il s'agit bien d'une vraie corne de vache, mais enfin...

Certaines cornes moins précieuses font moins de cinéma. On peut y lire à l'encre noire: Souvenir de l'Alpe d' Huez. Une chance leur est acquise de finir accrochées au mur. Mais pour la corne-jouet, le pronostic sera rédhibitoire: c'est le fond du placard.

Ph. D.

Dankoj: Mi dankas amikon el Caen, kiu tre afable bonvolis taksu la tekston, kiun mi esperantigis. La tre interesaj rimarkoj ebligis al mi plibonigi mian skribomanieron.